



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 1
1974

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo
41-a (50-a) jaro
Dumonata

Nova jaro kun novaj eblecoj

La jaro 1973 estas historio, nova jaro komenciĝis, kaj kun ĝi novaj esperoj ĝermis. Prave: Krizoj en la mondo faras ankaŭ al nia laboro malfacilaĵojn, sed ili devas nur instigi al des pli granda laboro. Ĉar la jaro venonta kaj jaroj venontaj donas al ni, kiuj loĝas en Norvegujo, pli grandajn eblecojn ol ni havis dum multaj jaroj.

Certe, fora lando estas tenta lando. Sed al ne tro «grasa» monujo la vojaĝo al Hamburgo estas pli ebla, ol vago trans tuta Eŭropo, aŭ eĉ al alia mondparto. Tio devus doni al pli multaj norvegoj la eblecon, ŝancon, travivi mondkongreson. Tio estas tiel unika travivaĵo, ke ĝi estas neforges-ebla. Kaj pli bona maniero ligi la membrojn al klubo kaj asocio, verŝajne ne ekzistas.

Al tiuj, kiuj havas tempon kaj monon por tio, estas rekomendeble iri unue al Helsingør, al la internacia altlernejo, al la fama paroliga kurso tie, por refreŝigi la parolkapablojn kaj la sciojn pri la internacia lingvo. Kaj — se vi ne havas eblecon al ambaŭ, tamen utiligi unu! Vi nepre ne pentos!

Jen por vi. Sed ankaŭ al la klubo estas nun la granda ebleco, nepre utiligota. La plej granda problemo de nia movado ja estas la rekrutiĝo. Sciuj: Venontjare, 1975, okazos en Jørstadmoen ĉe Lillehammer unu el la plej grandaj internaciaj aranĝoj: La Monda Ĵamboreo de la skoltoj. Al tiu venos miloj da knaboj, fervoraj por la kampara vivo kune kun aliaj knaboj el aliaj landoj. Kompreneble, se ili nur venos, loĝos en tendo, forvojaĝos, ili neniel havos la utilon kaj ĝojon, kiun ili povus havi, se ili jam antaŭ la alveno preparus la kontakt-on kaj la amikiĝon kun alilandaj skoltoj. Kaj jen la ebleco al ĉiu esperantoklubo en Norvegujo: Invitu la skoltojn al vespero(j) kun informoj kaj gaja programo, kun helpo al traduka sistemo por korespondo, kun atrakcia lingvoinstruo ĝis memstara interŝanĝado de leteroj. Kaj ne forgesu: La skoltoj havas insignojn, kiujn ili povas — kaj fervoras — gajni, kaj per viaj programoj vi povas rekte konduki ilin al tia prospero en la skoltado.

R.

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado, ni vame petas vin tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu sendi sian kotizon (kr. 30,00, familianoj kr. 10,00, junuloj kr. 10,00) al N.E.L. (poŝtĝirokonto 1.00.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi al la klubakasisto. Kaj al la klubaj kasistoj ni same varme petas: bonvolu *senprokruste* ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1974, kaj sendi liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj laŭeble baldaŭ. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L.; la kotizo estas «minimume kr. 45,00» por unu jaro. Klubanoj fariĝas subtenantaj membroj pagante kr. 20,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas ne-esperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

59a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hamburgo 27. Julio — 3. Aŭgusto 1974. Turisma Servo de N.E.L. (s-ino Kirsten Ek, Otto Ruges vei 66, 1345 ØSTERÅS, poŝtĝirokonto 1.00.32) sendas aliĝilojn kaj akceptas aliĝilojn, kotizojn kaj mendojn por la kongreso. Ĉar la vojaĝeblecoj al Hamburgo estas multaj, oni ne planas norvegan karavanon.

La kontorfondaĵo dum 1973 ricevis multe (proks. kr. 500) malpli da donacoj, ol en 1972; sed la elspezoj ne malkreskis. Ni tial devas denove memoriĝi pri tiu grava donac-fondaĵo. Ĉiu donaco estas tre valora helpo por la ekonomio de N.E.L.

La Propaganda Fondaĵo, kontraŭe, en 1973 denove ricevis kelkajn donacojn. Tiu fondaĵo i. a. permesas al ni eldoni propagand-materialon, subvencii preleg-vojaĝojn k.t.p., kaj ni tial permesas al ni memoriĝi la membrojn ankaŭ pri tiu grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. — *Februaro:* La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poŝtĝirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. — Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Marto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro :

Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio :

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo : En Norvegujo kaj eksterlando : n. kr. 12,—.

Anonprezoj : 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

povos uzi tiom da bildoj, ĉar uzo de klišoj estas multekosta afero. La provizora redaktoro tamen promesas fari sian eblon por doni al vi kontentigan gazeton.

Ni nur esperu, ke ni en la nova jaro ankaŭ sukcesos trovi novan redaktoron, kiu povas vere uzi tempon kaj fortojn por la gazeto. Kaj kun tio en la pensoj, mi deziras al vi ĉiuj:

Feliĉan Novan Jaron.

La redaktoro.

Membroj subtenantaj 1973 :

Ellen Høeg
Anton Gjelstad
John Selbekk

Membroj subtenantaj 1974 :

Anton Gjelstad
Anny Somdalen
Ruth Bentsen
Otto Hjertaas

DENOVE

nia gazeto aperas presita, kaj ni ĝojas pro tio. La presejo de Haave denove transprenis la kompostadon kaj presigon. La transiro al presejo kreis malfruigon, kaj ni petas pardonon pro tio. Sed la reiro al presita gazeto ankaŭ faras alian ŝanĝon: Ni ne plu

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj, kaj oni sendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri donac-abonoj al Norvega Esperantisto). La reviziita unua parto de la koresponda kurso fine aperis, kaj ĝi servos ankaŭ kiel nova ordinara lernolibro. Oni klopodos restarigi migrantan ekspozicion, kaj oni decidis transdoni la taskojn de la «Lerneja Kampanjo» al la Faksekcio de Instruistoj. Oni decidis okazigi la 44an Norvegan Esperanto-Kongreson en Tromsø en 1975. La presejo de Haave, Brumunddal, afable konsentis denove presigi nian gazeton ekde 1974. La kongresan rezolucion en Beogrado oni sendis al la koncernaj instancoj, kaj oni sendis al U.E.A. proteston kontraŭ tio, ke en Beogrado finna ambasada funkciulo salutis la kongreson en angla lingvo en la nomo de la 4 nordaj landoj.

La Liga Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzameno plenumita. Dum Novembro 73 elementan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Tom Jøran Bauer.

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. Ekzameno okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1974. Instruistano ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Majo. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn akurate kaj komplete!* — *Aliĝu, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekz. komitatoj:
OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1. Poŝtgirokonto 1.00.34.
BERGEN: S.ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6B, 5031 Laksevåg.

HAUGESUND: S.ro Olav Thormodsen, Boks 59, 5501 Haugesund.

SARPSBORG: S.ro Johan H. Rosbach Huldervn. 17 B, 1700 Sarpsborg.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkevn. 50, 4200 Sauda.

TR.HEJMO: S.ro Erling A. Haugen, Sig. Bergs Allé 12, 1700 Trondhejmo

Ekzamenaj kotizoj: Elementa ekzameno: kr. 7,00; supera ekzameno: kr. 12,00; instruista ekzameno: kr. 13,00.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Step-Bowitz

Elementa ekzameno en decembro 1973

TRADUKAJO

Jeg liker reker (1).

På brygga (2) satt en gammel mann og fisket med sin fiskestang (3). Mens fiskeren satt der, kom en av hans venner og begynte å snakke med ham. Vennen tygde (4) tobakk og spyttet (5) i sjøen. Men da han spyttet ut tobakk-tygga, mistet han gebisset (6) sitt i sjøen. For en ulykke! Fiskeren prøvde mange ganger å få tak i det med fiskekroken (7), men greide (8) ikke å ta det opp. Da fikk eieren (9) av gebisset en god idé.

«Sett ei reke på kroken!» sa han.

«Hvorfor skal jeg gjøre det?» spurte fiskeren.

«Jo, for jeg liker veldig godt reker, forstår du.»

1) reke = salikoko, 2) brygge = kajo, 3) fiskestang = fiŝvergo, 4) tygge = maĉi, 5) spytte = kraĉi, 6) gebiss = falsa dentaro (også: arta, artaĵa), 7) krok = hoko, 8) greie = sukcesi, 9) eie = posedi.

DIKTAJO

La pastro kaj la maljuna virino.

Venis nova kaj tre juna pastro al la paroĥo. Li estis tre fervora en sia laboro. De tempo al tempo li iris al la hejmoj de la paroĥanaro por pli bone koni la homojn kaj iliajn zorgojn. Iun tagon li vizitis naŭdek-jaran virinon, kiu ankoraŭ estis sufiĉe vigla por partopreni inteligentan konversacion. Dum la *bablado* la paroĥestro demandis: «Diru al mi, ĉu vi loĝis en

(daŭr. p. 15)

La kontorfondajo 1973

Pli frue	kr. 1345,85
S. Korstvedt	» 20,—
Kj. Gustavsen	» 50,—
O. Rygg	» 2,—
R. Bugge-Paulsen	» 30,—
C. S. B.	» 20,—
H. Andreassen	» 15,—
L. Belle	» 70,—
Aase Haube-Nielsen	» 10,—
C. H. Baklund	» 15,65
G.. Ringstad	» 10,—
Agot Pedersen	» 30,—
<hr/>	
	kr. 1618,50

Kampanjo Reisæter 1973

Pli frue	kr. 2800,—
R. Bugge-Paulsen	» 100,—
<hr/>	
	kr. 2900,—

Kampanjo Reisæter 1974

Arthur Bjerke	kr. 100,—
Johan Matland	» 100,—
Elna Matland	» 100,—
Aslaug Refsing	» 100,—
Leonora Sivertsen	» 100,—
Erling Anker Haugen	» 100,—
<hr/>	
	kr. 700,—

La Propaganda Fondajo 1974

Pli frue	kr. 50,—
O. Børresen	» 45,—
Sverre M. Halbo	» 300,—
La Esp.klubo de Bergen	» 50,—
<hr/>	
	kr. 445,—

Donaco al la Liga kaso 1974

Anonimulo	kr. 1000,—
-----------	------------

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

NEPRE

Karaj norvegaj samideanoj!

En la jaro 1973 tre malmultaj samideanoj sendis poŝtmarkojn al nia gazeto. Oni povas kalkuli ilin per la fingroj de unu mano! Eĉ malpli da personoj el Norvegujo mendis poŝtmarkojn el nia stoko. Ĉu nur eksterlandaj esperantistoj kolektas poŝtmarkojn aŭ havas konatojn, kiuj kolektas? Ĉu neniu norvega esperantisto konas knabeton, al kiu oni povas doni pm.? Kaj se vere estas tiel, ĉu neniu volas apogi nian agadon per... sia laboro, sia tempo, siaj ideoj, siaj kronoj? En Sarpsborg estas nun sufiĉe granda stoko da pm., kiuj nur atendas aĉetantojn. Certe, la helpredaktoro en la menciita urbo vendas el tiu stoko al siaj konatoj — sed tiu vere ne estis la ideo, ĉar jam la ordigado de la pm. estas temporaba afero. Tamen ni povis ŝpari multon ankaŭ en la pasinta jaro, ĉefe danke al la eksterlandaj donacintoj kaj aĉetintoj — kaj danke al transakcioj, kiuj havigis al ni du plenajn albumojn da tre malmultekostaj pm., kiuj estas facile vendeblaj al geknaboj. Sed nun ni atendas vian helpon — nepre!



La mendoj alfluas

La anoncita studkajero pri «La Neĝbulo» kaŭzis viglan reagon de mendoj. Se vi ankoraŭ deziras ekzempleron, vi mendu tuj. Ĉion pri la kajero bonvolu legi en n-ro 6/1973.

JUBILEOJ

Erling P. Næss 60-jara

Erling P. Næss, la konata aktivulo en Trondhejmo, la 16an de Januaro pasis la 60-jaran mejloŝtonon. Li estis dum multaj jaroj jen prezidanto, jen sekretario de Grupo Esperantista — dum longa tempo la senlaca administranto de la korespondaj kursoj de NEL, kaj aktivulo en Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Postfeste niajn sincerajn gratulojn!

★

L. Friis 70-jara

L. Friis, la patro de la someraj kursoj en Helsingør kaj la nelacigebla eldonanto kaj estro de la Dana Esperanto-Eldonejo, la 23an de Januaro fariĝis 70-jara. Ankaŭ multaj norvegoj ĝuis liajn somerajn kursojn kaj admiras lian eminentan kaj afablan gvidadon. Ni sendas al li niajn plej korajn gratulojn!

★

Madeleine Haudebine 75-jara

Nia kara Madeleine Haudebine la 12an de Februaro fariĝos jam 75-jara. Ŝi estas bone konata en nia lando pro sia plurjara agado kiel fervora kursgvidantino. Poste ŝi dum multaj jaroj propagandis kaj gvidis kursojn en Hindujo, kie ŝi fariĝis pioniro de Esperanto. — Ni sendas al ŝi elkorajn dankojn kaj gratulojn!

★

Okaze de la datreveno de nia majstro:

Televida esperanto-kurso

La regiona televido «Langvedoko-Rusiljono» dissendis la 15an de Decembro 1973 intervjuon de pioniro René Llech-Walter, sur la strato de Dro. Zamenhof kiu situas en centro parto de la urbo inter la Konsula Palaco kaj la Ĉefa poŝtoŝtanco de Perpignan.

Sed la estro de la stacio de Montpellier opiniis ke tio ne sufiĉas kaj proponis al Sro. Llech-Walter fari la unuan lecionon de esperanto kun gramatikaj klarigoj. Kompreneble nia pioniro tuj akceptis.

Do la Televido venis ĉe la sidejo de la Federacio Langvedoko - Rusiljono, 5, Quai Vauban-Perpignan kaj filmis la grandan portreton de Zamenhof la libroj «Je parle esperanto» (Thierry) «Que sais-je? L'Espéranto» (Janton), «L'Espéranto vivant» (Delaire) kaj ankaŭ aŭtografon de Dro. Zamenhof.

Tiamaniere okazis longa kaj bona prezento de nia lingvo kaj de nia movado ĉe la regiona franca televido je horo de ampleksa aŭskultado.

A. Vidal

KORESPONDU!

Svedo, 55-jara, sola oficisto, volonte volus korespondi kun esperantistino el Norvegio — prefere pri literaturo kaj pentroarto. — S.ro Jan Vedevik, Poste restante, S-40101 Göteborg, Svedlando.

Pelvo



Ĉu Rafaelo pentris sur fundo de pelveto?

Oni rakontis, ke Rafaelo en gastejo ekvidis neordinare belan virinon kaj pentris ŝin sur la fundo de pelvo, ĉar li havis nek paperon nek tolon. Ĉu la historio estas vera?

Estas pruveble, ke ĝi ne estas vera. Kiam oni restaŭris ĝin, oni trovis, ke ĝi origine estis kvarangula. Do la ronda formo de la pentraĵo estigis la historion, kiu devus klarigi la rondan

formon. — Vi konas similan historion el la norvegaj fabeloj — ni celas tiun, kiu volas klarigi, kial la vostopinto de la vulpo estas blanka. Tia historio nomiĝas etiologia historio.

Adverber er en gruppe ord som står til adjektiver eller verber. På esperanto skiller man mellom adver-

(daŭr. p. 16)

Recenzoj

Adolf Holzhaus: Doktoro kaj lingvo Esperanto. Eld.: Fondumo Esperanto, Helsinko, 1969. — 524 paĝoj, bind. Prezo: kr. 100.

Ĉi tio ne estas ordinara biografio pri d-ro Zamenhof. La aŭtoro estas esploranto, kolektanto de faktoj kaj detaloj, por kiuj li ĉiam serĉas dokumentadon, kaj estas admirinde kiom da dokumenta materialo li sukcesis havigi pri la plej diversaj detaloj rilate al d-ro Zamenhof. Tio ebligis al li korekti diversajn erarojn en pli frue aperintaj verkoj de ekz. Edmond Privat kaj aliaj.

Kiel vera esploranto la aŭtoro deziras konigi al la publiko la rezultatojn de siaj esploroj. Kelkfoje dum la legado oni pensas, ke multaj el la detaloj estas tro sensignifaj. Aliflanke, kiam temas pri unu el la grandaj homoj en la historio, ja neniu detalo estas sen intereso. Tamen eble iom da kribrado estus avantaĝo.

La verko limigas sin al kelkaj flankoj de la temo Zamenhof kaj Esperanto, precipe tiaj, kiuj ne troviĝas en la ordinara biografioj. Estas longa ĉapitro pri la patro kaj la hejmo. Preskaŭ duono de la libro estas dediĉita al la lingvoscioj de Zamenhof, kun kopioj de dokumentoj, kaj kun tradukoj se ili estas alilingvaj. Troviĝas detala pritrakto pri la deveno de la afiksoj en Esperanto, listoj de Zamenhof-monumentoj kaj -stratoj (ambaŭ norvegaj enestas). Plie oni trovas ĉapitron pri la historio de la spesmilo (esperanta monunuo de an-

taŭ la unua mondmilito), kaj ĉiuj poemoj de Zamenhof, originalaj kaj tradukitaj. Estas ankaŭ kelkaj malpli longaj ĉapitroj pri aliaj temoj.

Por ĉiu serioza interesiganto pri la historio de nia lingvo la verko estas abunda fonto de informoj, kun fotokopioj de originalaj dokumentoj kaj kun skrupule faritaj reproduktaj detaloj de aliaj. Abundas historiaj fotografiaĵoj. Se dokumento estas en rusa, hebrea, angla, germana aŭ alia lingvo, oni trovas akuratan tradukon.

Oni ne legas ĉi tiun libron, oni legas en ĝi, serĉas en ĝi. Nur bedaŭrinde ke la aŭtoro ne komprenas la difinan artikolon «Ia», kiun li do, laŭ la konsilo de Zamenhof, tute ne uzas! Mi varme rekomendas la verkon al ĉiu sincera esperantisto.

C. Støp-Bowitz

I. Turgenjev: Patroj kaj Filoj. El la rusa tradukis d-ro Kazimierz Bein (Kabe). 3-a represo, 1973. Dansk Esperanto-Forlag.

Kiel recenzi libron kia tia? Literature ĝi estas mondkonata, inter la veraj juveloj de la mondliteraturo. Recenzisto en malgranda esperantogazeto devas muti pri la libro, ne decas fari ian ajn juĝon pri la enhavo.

Sed se tio estas fakto, ne malpli estas fakto, ke la traduko ankaŭ estas ekster la juĝo de tute ordinara esperantisto, eĉ se li havas ekzamenojn kaj mem verkis iom en la internacia lingvo. Longe antaŭ mia esperantistigo Kabe estis nomo, pri kies kvalitoj neniu povis dubi.

Sed la lingvo ja evoluas. Jes, certe - kaj pro tio aldoniĝas multaj vortoj, kiujn Kabe ne bezonis por majstre

redoni la verkon de Turgenjev. Kaj estas ĝojo al moderna esperantisto vidi, kiel facile fluas la lingvaĵo de Kabe en traduko farita jam en 1909.

Prave — «Literatura Komitato» trastudis la libron por modifi aŭ modernigi la lingvon. La komitato sin limigis «ĝis nepra neceso», pro kio ni vere povas ĝoji, ĉar nur tiel ni ree havas la verkon de Kabe. En suplemento la komitato klarigas pri sia laboro.

Mi do nur povas esprimi mian ĝojon pro la noveladono, kiu ebligas al mi (esperantisto jam antaŭmilita) kaj al la tuta nova generacio konatigi kun Kabe, ke lia nomo ne plu restu nomo, nur.

Haro

*
Robert Fisker: Morso-Klubo. Tradukis Gudrun Riisberg. Dansk Esperanto-Forlag.

Jen malgranda, ofsetita kajero (Maŝintajpita kun interspaco inter la linioj, preskaŭ aŭ tute ne malgrandigita, verŝajne ofsetita per «kontorofseto» de Dansk Esperanto-Forlag) kun entute 32 paĝoj krom kartonita kovrilo. La kajero enhavas plurajn desegnaĵojn, kiuj pliinterestigas la rakonton al la infanoj. Ĉar estas porinfana libro, kun du simplaj, iom streĉigaj rakontoj, kiuj ambaŭ povus esti veraj (jen io vere valoras) kaj tial konvena por geknaboj en la komencaj lernejoj jaroj.

Kunsendata letero de la eldonejo rakontas, ke la vendoprezio estas danaj kr. 4,50. Tio ŝajnas iom multtekosta por kajero kun nur tre modesta enhavo (ambaŭ rakontoj povus esti presitaj sur 5 aŭ 6 paĝoj en Norvega

Esperantisto). Sed — kvinkrono ja tamen preskaŭ neniom valoras. Do: por via infano.

R.

Libroj lastatempe ricevitaj:

Holzhaus, Adolf: Verkoj de H. Heine en Esperanto. Kr. 32,50.

Forge, Jean: Mr. Tot aĉetas mil okulojn (represo). Originala fantazia romano. Prezo kr. 30,00.

Forge, Jean: La verda raketo (represo). Originalaj noveloj. Kr. 17,50.

Forge, Jean: Abismoj (represo). Originala romano. Prezo kr. 17,50.

Forge, Jean: Saltego trans jarmilojn (represo). Originala fantazia romano. Prezo kr. 22,50.

Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong, II. Kr. 18,00.

Koleriko en Noktomezo.

La deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (Dokumentoj).

Komuniko

Okaze de la granda turisma movado al Romo antaŭvidita por la sankta jaro 1974—1975, la provinca turisma organizaĵo de Romo (E.P.T.) sin deklaris preta republikigi bildajn broŝurojn pri romaj monumentoj kaj vidindaĵoj en esperanto, kondiĉe ke ĝi konstatu pro la nombro da petoj, la utilon kaj la oportunon de tialingva broŝurpresado.

Sekve ĉiuj interesatoj, personoj kaj grupoj, estas konsilataj peti senprokraste esperantlingvaj broŝurojn skribante al: E.P.T., via Parigi n. 1, 00187 Roma, Italio.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek



El «VART YRKE»

Pretigita por tunelo sub la Brita Kanalo

La planoj pri kunligado de Britio kaj la Kontinento pere de fervojtunelo sub la Brita Kanalo estas relative malnovaj. Kaj de brita kaj de franca flanko dum multaj jaroj diskutiĝis kaj prilaboriĝis vico da alternativoj. 20/10 1972 okazis tamen io kio signaligis ke ĉi tiu grandega projekto nun fariĝas al io pli ol revo kaj neklara plano. Ĉi tiun tagon nome subskribiĝis «Konvencio nr. 1 pri fervojtunelo sub la Kanalo» samtempe en Londono kaj Parizo. Kvankam ĉi tiu konvencio ne estas priatraktigante kiel la definitiva decido je starigado de la projekto, signifas la interkonsento ankaŭ ke la registaroj kaj la privataj institucioj kiuj partoprenos volonte investos kapitalon. Tio kio plue okazos estas jena: Ĝis julio 1973 la kompletaj planoj ellaboriĝas. Poste subskribiĝos «Konvencio nr. 2» kaj propono prezentiĝos al la parlamentoj en Britio kaj Francio. Dum la tempo aŭgusto 1973 — februaro 1975 komenciĝos la tunellaboro. El la elspezoj financiĝos

30% de privataj interesuloj kaj 70% pere de ŝtatgarantiita pruntaĵo. Laŭ la plano la laboro finiĝos, kun terminaloj kaj kun fervoj- kaj vojprovizoj ĝis 1980. La tunelo sub la Kanalo laŭ prikalkulado kostos 6 miliardaj da frankoj. — La tunelo sub la Kanalo estos 52 km longa — 36 km situas sub la marfundo. Inter Dover en Britio kaj Sangatte en Francio konstruiĝos 3 tuneloj. 2, kiuj servos por trafiko, ricevos diametron de 6,85 m, kaj la laŭlonga distanco inter ili estos 30 m. Inter ili konstruiĝos helptunelo kun diametro de 4,85 m. La 3 tuneloj inligiĝos kun transversaj tuneloj po opaj distancoj 250 m. La plej profunde situante punkto de la tunelo sub la marsurfaco estos 108 m, kaj la dikeco de la ŝtonkovraĵo super la tuneloj estos minimume 30 m. La maksimuma ascendo estos 1 m po 100 m kaj la minimuma kurbradiuso estos 4000 m. Ĉi tio ebligas ke la trajnoj povos veturi sub la Kanalo kun rapideco de 200 km po horo.

Norvega Kroniko

Klubo Esperantista en Oslo

6/11. La prezidanto bonvenigis. — «UNO kaj lingvoj» estis la tre interesa kaj aktuala temo pri kiu John Berggreen unue faris enkondukon. I. a. li menciis ke por la 133 aliĝintaj landoj estas 5 oficialaj — kaj 8 laborlingvoj kaj, ke pro tio la presado de la cirkuleroj en tiom multe da lingvoj kostas grandegan sumon. Poste estis interesa diskuto gvidata de la prezidantino. La partoprenantoj menciis - kaj donis plurajn gravajn punktojn kaj informojn ekzemple pri: «Diskriminacio de «ne ĉefaj» lingvoj kiuj ne estas oficialaj, diskriminacio de la Homaj rajtoj koncerne la lingvoj, k. t. p.» En tute, ĉiuj ĉi tiuj lingvaj problemoj kaj — malfacilaĵoj montras la necesecon de unu komuna lingvo kaj do signifas grandan ŝancon por Esperanto. Okaze de la 25jara jubileo de la deklaro de la Homaj rajtoj la klubo sendos alvokon al la gazetaro.

Poste estis divenkonkurso aranĝita de Th. M. Carlsen. Dum la kafopaŭzo ni kantis akompanata de R. Grotmål kiu ankaŭ prezentis belegajn kantojn.

19/11. La visprezidanto bonvenigis. La programo «Klubkunveno en nova maniero» estis tre interesa. La ĉeestantoj dividiĝis en grupoj kun 3 aŭ 4 partoprenantoj ĉirkaŭ la tabloj, kaj Kirsten Ek donis al ni taskon, nome: «Skribu al nia klubano Otto Prytz, kiu preskaŭ unu jaro estis en Hispanio, saluton». Poste ni ricevis alian taskon. Sur granda papero fiksita sur

la muro estis desegnita homfiguro, kaj ni provis mencii — skribi sur listoj — la plej multe de la nomoj de la partoj de la korpo. Post 5 minutoj la grupoj laŭtleĝis la nomojn. Tre bona maniero por lerni novajn vortojn kaj por rememorigi vortojn kiujn oni ja estis forgesintaj.

4/12. La vicprezidanto bonvenigis. C. Støp-Bowitz referis cirkulerojn de N.E.L. i. a. pri la donacabonado de «Norvega Esperantisto», pri la landa kunveno, kiu okazos en 1975 en Tromsø, kaj pri la kontingento por la diversaj kategorioj da anoj. Plue li menciis i. a. ke nova redaktoro estas bezonata kaj ke la nuna, provizora redaktoro deziras pli da materialo por «Norvega Esperantisto», plue ke la norveglingva libro pri Zamenhof ankoraŭ estas havebla por 3 kr. Poste li transdonis al Tom Jøran Bauer la diplomon por la ekzameno kaj esprimis la deziron, ke multaj aliaj ankaŭ faru la samon. — Einar Gustavsen paroletis pri Madejro, kie li kaj lia edzino estis, kaj poste ni vidis multajn lumbildojn de tiu bela loko, faritajn de Else Bugge Paulsen kaj Harda Danielsen kiuj ankaŭ estis tie dum la somero.

Raportis Odd Kolbrek

Sauda Esperantoklubb

Klubkunveno 10/12-73 ĉe ges. Andersen. — La prezidantino malfermis kaj gvidis la kunvenon, kiu estas la lasta tiun ĉi jaron. N. J. Matland disdonis al la ĉeestantoj reprezitojn de tre bona propagandbroŝuro pri Esperanto, svedlingva. La intenco estas uzi ĝin kiel modelo por eble norvega propagandpresaĵo por Esperanto. —

Elna Matland parolis pri «La tago de la libro». Ŝi inter alie menciis la esperantan literaturon kiu nun estas tre ampleksa. Kiel fino ŝi legis eltirafon de Peer Gynt. Poste la ĉeestantoj laŭtlegis memelektitajn esperantlingvajn poemojn. — N. J. Matland parolis tre bone pri «La universala deklaracio de la homaj rajtoj». — Kantado, kaj kafopaŭzo kun bongusta manĝado. La novembran cirkuleron de N.E.L. laŭtlegis la sekretario. Elotado de libroj.

Kluba jarkunveno 14/1-74 ĉe s.ino Karen Berge. — Post malfermaj bonvenigaj vortoj de la prezidantino la sekretario legis la jarraporton; tiu montris ke la membroj estis tre aktivaj en sia klubo. La revizoro legis la kalkulaĵon, kiu montris malgrandan profiton. Ambaŭ raportoj akceptiĝis sen rimarkoj.

Elektioj: La prezidantino kaj la sekretario, kiuj deĵoris en tiuj oficoj dum la lastaj 5 jaroj, deziris nun liberiĝi de ili. Tiun peton la aliaj beklubanoj finfine akceptis — kaj jen la nova estraro: prezidanto: Norman Birkeli; vicprezidanto: Arthur Bjerk; kasisto: Olga Overskeid; sekretario: Olav Andersen; estrarano: John Malmquist. Ĉiuj unuanime elektitaj.

Post bongusta manĝaĵo, regalita de filino de la dommastrino, ni transiris al pli amuza programo. Inter alie la gasto de la vespero, Oddvar Birkeli, ludis gitaron kaj kantis esperantaj kantojn, kelkfoje ankaŭ akompane kun sia frato Norman.

80% de la membroj ĉeestis la kunvenon.

A. Bj.

*

La Esperantoklubo de Bergen

Post informo de N.E.L., la itala «Esperantoabato» Ciccanti venis per hidrofojlo al Bergen de Haugesund. Jenny Jahren kondukis lin rekte al Bergens Tidende por intervjuo. La sekretario tradukis. La okcidentnorvega radio ĵus translokiĝis al la nova halo de Grieg, kaj oni tie bedaŭris ke la sendotempo kiam la abato restis en Bergen jam estis plene okupata, sed oni proponis intervjuon kun la sekretario pri abato Ciccanti post la vizito en Bergen. — Vespere la klubo kolektiĝis, kaj Ciccanti prelegis pri Franco de Assisi kaj montris lum-bildojn de lia hejmloko kaj ĉefaj eventoj de lia vivo. Poste li invitis nin al sia hejmurbo Rimini, Venecio kaj al la ŝtato San Marino. Ĝuante italan supon, la geklubanoj utiligis la okazon demandi pri Italio kaj la spertoj de Ciccanti dum liaj multaj vojaĝoj.

Semajnon poste la klubo kunvenis ĉe Jenny Jahren, kie ŝi rakontis pri la UEA-kongreso. Ashild Birkenes rakontis pri la blindula kongreso kaj la restado poste en feria loko en Jugoslavio. La ĉefa impreso estis ke la jugoslavo volontas akceptus gastojn de la tuta mondo, sed ke la organizado kelkfoje lametis, ekzemple post «akademia kvaronhoron» oni kutime aldonis «jugoslavan kvaronhoron».

Vizitis nin du ĉarmaj novulininoj kiuj espereble membriĝos.

Kjell Offerdal

59-a Universala Kongreso de Esperanto

HAMBURG 27/7—3/8 1974

Alta Protektanto:

D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo
Konst. adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam - 3002, Nederlando

Adreso de la Loka Kongresa Komitato:
Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80

OFICIALA KOMUNIKO

Jen la tarifo ekde 1/1 1974:

- | | |
|---|--------|
| 1. Kongresano ne membro
individua de UEA | 107,80 |
| 2. Kongresano individua
membro kun jarlibro (MJ) | 92,80 |
| 3. Kongresano individua
membro kun Jarlibro kaj
revuo «Esperanto» (MA) .. | 77,80 |
| 4. Edz(in)o de kongresano en
kategorio (1) | 75,50 |
| 5. Edz(in)o de kongresano en
kategorio (2) aŭ (3) | 65,— |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara | 31,90 |
| 7. Universitata studento ĝis
inkluzive 30-jara | 53,90 |
| 8. Blindulo | 42,90 |

Unua Oficiala Bulteno
al UEA-membroj

Ĉiuj membroj-abonantoj de UEA ricevis kun la oktobra numero de la revuo «Esperanto», kiel aldonafon, la kvarpaĝan ilustritan Unuan Oficialan Bultenon pri la UK. Aliaj povas ĝin ricevi senpage de la Konstanta adreso de la Kongreso aŭ ĉe la landaj kotizperantoj.

Antaŭ Hamburgo:
Tra pitoreska Nederlando

Antaŭkongresan aŭtobusekskurson tra Nederlando organizas f-ino M. H. Vermaas (Nieuwe Binnenweg 70, II, R, Rotterdam-3002). Ĝi ekveturos el Rotterdam dimanĉon la 14an de julio kaj alvenos en Hamburgo ĵaŭdon la 25an de julio. Temas do pri karavanvojaĝo al la kongresurbo, kun survojoj ekskursoj kaj tranoktoj en hoteloj. Prezo, ĉion inkluzive: 885,- gld.

Blinduloj kongresos samtempe.

En la kadro de la 59a UK (do ne pli frue, kiel en 1973) okazos ankaŭ la 42a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Interesitoj turnu sin al la kompetenta LKK-ano, s-ro Karl-Heinz Hoffmann, D-2000 Hamburg 54, Genseneck 14.

Rezervu frue por viaj infanoj!

En la 14a Internacia Infankongreseto estos lokoj por nur 51 infanoj. Estas tial konsilinde tre frue anonciĝi, petante specialan aliĝilon de la adreso de LKK.

Ankaŭ KELI kaj IKUE en Hamburgo

Komuna ekumena kongreso de Kristana Esperantista Ligo kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazos en la semajno anlaŭ la UK, en Hamburg-Langenhorn.

Por kolektantoj

La Loka Kongresa Komitato jam presigis belajn dukolorajn kovertojn kun la emblemo de la Kongreso. Ili estos aĉeteblaj kiel «unuatagaj kovertoj» dum la UK.

Rektoro de ISU nomita

Kiel Rektoro de la 27a Sesio de la Internacia Somera Universitato, oka-

zonta en la kadro de la Universala Kongreso, funkcios prof. d-ro Helmut Ebinger, fakulo pri geografio, katedra profesoro en la Universitato de Hamburgo kaj membro de Germana Esperanto-Asocio.

Premioj gajneblaj!

Monpremioj de po 100, 70 aŭ 40 guldenoj atendas la sukcesantojn en la kvar diversaj branĉoj de la Belartaj Konkursoj 1974, kiujn rajtas partopreni ĉiu aliĝinto de la Universala Kongreso. La branĉoj estas: Originala poezio; Tradukita poezio; Originala prozo; Originala drameto. — Entute estas gajneblaj premioj ĝis la sumo de 910,— guldenoj!

Detala regularo de la Belartaj Konkursoj estas senpage ricevebla ĉe la Konstanta Adreso de la Kongreso. La sekretariino de la Konkursoj estas: S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, Zagreb, Jugoslavio. Limdato por konkursajtoj: la 31a de marto 1974.

Statistiko pri la aliĝintoj ĝis la 8a de novembro 1973

Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstrujo 3, Belg. 5, Braz. 1, Brit. 10, Bulg. 15, Ĉeĥ. 2, Dan. 3, Egipt. 2, Finn. 4, Franc. 9, FR Germ. 30, Grek. 1, Hisp. 5, Hung. 10, Irl. 1, Isr. 1, Ital. 5, Jap. 6, Jug. 32, Kanado 3, Koreujo 1, Madag. 1, Monako 1, Ned. 7, Norv. 2, Nov-Z. 1, Pol. 6, Sudafr. 1, Sved. 10, Svis. 4, Urug. 1, Usono 5, Zairo 1. — Entute: 191 aliĝintoj el 35 landoj, el kiuj do nur 2 norvegoj.

KORESPONDUI

Instruistino de piano deziras korespondi: Nina Klodas, Orla 40, Pabianice, Pollando.

† Tryggve Davanger

*La morto minacas fulme
La plej bonaj mortis el ni*

Ĉi tiuj trafaj vortoj de Nordahl Grieg venis en niajn korojn kiam ni subite vidis ke nia kara samideano Tryggve Davanger mortis la 4an de Decembro pro kormalsano. Dum jardeko li estis unu el la «kernuloj» de nia klubo, plejparte kiel estrarano. Lia hejmo ofte estis rifuĝejo kiam nia klubo mankis renkontejon, kaj lia edzino kaj li malavare akceptis la gesamideanojn. Per sia humorplena sinteno li ofte trankviligis viglajn diskutojn, kaj kiel ĉarpentisto li ĉiam estis preta servi siajn geamikojn. La klubo estonte vere manksentas vian foreston.

La Esperantoklubo de Bergen
Kjell Offerdal

Helsingør 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo. — Karavanvojaĝo el Helsingør al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

Internaciaj Feriaj Kursoj Helsingør, Danlando

21.—27. de julio 1974

Ni invitas vin veni al Helsingør (Elsinoro) por ĉeesti niajn internaciajn feriajn kursojn, konatajn en la tuta Esp-mondo, ĉar ili funkcias jam 42 jarojn. Ordinare ĉeestas pli ol 100 personoj el 10—15 diversaj landoj. — Tie vi havos riĉan eblecon de konnacia amikecon kun multaj diversversacia ekzerco kaj por trovi interlandaj gesamideanoj.

Nur antaŭtagmeze okazas la instruado — en jenaj kursoj:

1) *Elementa kurso* laŭ metodo de Friis. Ĝin povas partopreni anoj diversnaciaj, ĉar la metodo estas internacia kaj aplikas nur Esperanton. Per tiu metodo oni lernas pli multe ol per alia metodo dum unu semajno.

2) *Konversacia Kurso*. Multaj samideanoj bezonas parolekzercon, kaj tial ĉi tiu kurso estas tre grava. La gvidantino scias paroligi ĉiujn en bonhumora kaj gaja maniero.

3) *Perfektiga Studrondo*. Stilo kaj formo de nia lingvo estas la ĉefaj temoj de la studronda studado kaj diskutado.

4) *Prepara Kurso por Friis-metodaj geinstruistoj*. Ĉi tiu metodo — simila al «Naturmetodo» — estas la metodo de la moderna tempo. Tial ankaŭ ni devas apliki ĝin, sed multaj samideanoj ankoraŭ ne konas ĝin. Tial ni invitas vin veni ĉi tien por studi ĝin praktike — kaj vi miros pro ĝiaj bonegaj rezultoj. Kurso n-ro 1 estas parto de ĉi tiu.

NB. Ankaŭ *Ne-Kursanoj* estos kore bonvenaj en ĉi tiu semajno.

La kosto de la partopreno:

Por ĉiu persono en
2-persona ĉambrodkr. 580,—
1-persona ĉambrodkr. 640,—

Apud ĉiuj ĉambroj estas necesejo kaj duŝejo.

Infanoj malpli ol 6-jaraj pagas nur duonan prezon, malpli ol 12-jaraj tri-kvaronan prezon.

En la parko de la altlernejo ekzistas loko por tendumado. Tendumado en propra tendo, plena manĝo kaj kurskotizo por ĉiu persono kostas 500 dkr.

Venu por ĉeesti nian internacian semajnon! — Neforgesebla estas tia feria tempo en la sincere amika atmosfero de niaj kursoj. Tial ne prokrastu la aliĝon, sed sendu ĝin baldaŭ (prefere antaŭ 15/6-74) al

s.ro L. Friis, Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

NB. La kurskomitato ne deziras antaŭpagon de la kurskostoj. La kurskasisto akceptos la pagon en la dua kurstago.

ELEMENTA EKZAMENO

(daŭr. de p. 4)

tiu ĉi paroĥo dum via tuta vivo?»
La maljunulino sidis longan tempon en *profundaj* pensoj. Sed post ioma tempo ŝi respondis: «Ne, ankoraŭ ne.»

paroĥo — prestegjeld
fervora — ivrig
zorgi — sørge for, dra omsorg for
zorgoj — bekymringer
babili — prate
profunda — dyp

Pelvo

(daŭr. de p. 7)

ber som er dannet av adjektiver med endelsen e istedenfor adjektivets a, og adverbet som består bare av adverbstammen og ikke har noen endelse. I teksten ovenfor finnes bare *ne* og *nek* av denne typen; vi kunne nevne *ankaŭ* og *almenaŭ* og *tamen* — det ville føre for langt å regne opp alle. På norsk merker man straks betydningsforskjellen i ordet «lite» i følgende to setninger: «Katten er et lite, renslig dyr» og «Grisen er et lite renslig dyr». I første tilfelle er «lite» adjektiv, står til substantivet «dyr»; i andre tilfelle er det adverb, står til adjektivet «renslig». I teksten ovenfor står «neordinare» som adverb til «belan» — det var kanskje ikke en neordinara virino!

«Pruveble» er også adverb. Merk at ordet skulle hatt endelsen a hvis subjektet hadde vært *tio*: *Tio estas pruvebla*. Her syndes det ofte! På samme måte a-endelse når subjektet er *ĝi*: *ĝi ne estas vera*.

Ak III.

*

Korespondu!

55-jara librotenisto kaj fremdlingva korespondanto, kiu admiras la nordajn landojn, deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn, gazetojn, ev. librojn, spertojn, opiniojn kaj diversajojn kun interesiĝantoj (laŭeble virinoj) el Oslo, Hamar, Trondhejmo, Narvik. Ĉefintereso: lingvistiko, hi-

storio, geografio, malnova arĥitekturo, fotografio, antropologio, naturo, sporto, muziko (klasika k. populara). Robert Walenta, Divišovo nám. 3, CS-669 02 ZNOJMO, Ĉeĥoslovakujo.

Mi kaj miaj gelernantoj tre interesiĝas pri la vivo, kulturo k.t.p. de gejunuloj de via lando. — Profesoro K. Kalĉevski, str. V. Kolarov 63 - 9, TOLBUĤIN, Bulgarujo.

27-jara elektroteĥniko inĝeniero — komencanto de Esperanto — deziras korespondi por plibonigi siajn lingvosciujn kaj ricevi eksterlandajn amikojn. — Frieder Sonntag, Reppchenstr. 10, DDR-8313 DOHNA, D.D.R.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 10030
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 10032

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 10031
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 77620

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1

Trykt i Haaves Boktrykkeri, Brumunddal